

La roloj de Dio kaj religio en *la Infana Raso*

(Profesora kaj lernantara analizo)

La unua teksto de INFANA RASO kiun mi havis ĉemane estis ĝia unua eldono sen aŭtoraj notoj kaj malmulte da komentoj. Ĉi subaj rimarkoj de neortodoksa kritika studo pri la aŭtoraj aŭ poemaj sintenoj rilate Dion, religion kaj religianojn, estas la tuja reago de kredanto... Poste eliris novaj eldonoj kun aŭtoraj notoj kiuj nur ŝajne helpas mildigi la reagojn de kredanto. Ĉiukaze jen tiuj unuaj reagoj.

Fine mi trovis kuraĝon kaj animdispozicion por legi “*La infana raso*” de W. Auld, min liverante al la invito de ĝiaj legantoj kaj ŝatantoj kiuj ne mankis min riproĉi pro tia mia manko. Ĉu legi por gustumi la poeziecon aŭ por provi sintoniĝi kun la verka konceptaro? Kaj ĉu eblas distingi la du aspektojn sen aliigi la unuan aŭ la alian? Tamen, eĉ dum la unua supraĵa legado, mi sentas ke el ĝi ŝprucas precizaj kaj eĝaj juĝoj, kiuj enŝteligas la dubon, ĉu la poeto profitas poezion por lanĉi siajn ideologiajn vidpunktojn pri la mondo kaj historio kaj destino de la homo kaj homaro aŭ profitas ĉion tion por pli nutri la poeman poeziecon. Mi tamen nun distingas la du por haltadi ĉe la viv- kaj histori-konceptadoj rilate religion, ĉar tiu ĉi aspekto, krom gravega, estas malmulte konsiderata kaj des malpli evidentigata.

Dume antaŭmetendas indiko pri la enhavo de la poemo, se povas estiĝi ĉi-kaze enhavo sen poezio: laŭ la poemo, la homo vivanta estas necesa ĉenero el paseo al la estonto, realiganta la celon (*celo*, laŭ aŭtora komenta noto, estas *la instinkto certigi la daŭrigon de la raso per generado de idoj*) kaj post tia amlezkzisto malaperanta el ĉiuspeca ekzisto. Kiun estontecon la homaro konstruos? Ĉu ĝi sukcesos eliri de stranga kaj kontraŭdira konduto praktikita de antaŭ la erao de *Sargono la Unua*, el kies epokaj eltrovoj materiaj, la civilizo pliprogresis jes, restante tamen blokita, rilate tiujn, moralajn kaj sociajn? Ĉu ni rajtas rigardi la estontecon kun iom da espero? Ŝajnas ke jes, se konsideri, ke la homo ankoraŭ junas ĉar li estas ankoraŭ *Infana Raso*.

Junas ankaŭ - sed per jena konsidero oni foriras el la striktaj verkaj temo kaj senco - pro tio ke ĝi, kvankam ne aperinta kiel lasta inter la favoritaj estuloj de la evolucio, konservas sian DNA-n nevaria kompare kun la samtempaj aŭ postaj aŭ antaŭaj specioj, kaj estas la plej simila, inter ĉiuj primataj specioj evoluintaj post ĝi, al sia praularo (la unuaj hompraavoj starpoziciaj - la aŭstralopitekoj - aĝas kvar milionojn da jaroj!).

Ĉiukaze, por Auld la homa unuopulo estas nur papertransigulo. Parafraze:

ni ne vidas la celon

ni ĝin plenumas (XIV),

eĉ ĝi dissolviĝas tute en tia tasko:

la celon ni plenumas

la celo nin konsumas (XXV).

Kiu estas la homo laŭ Auld?

La poemo komencas plonĝante kun plena jubilo en la kaptigan klarecon de jenaj versoj:

..... kiam kun elemento

kuniĝis elemento pro kosma akcidento

kaj la unua flagro ekaperis

ho, tiu nekonebla momento MIN generis! (I)

La poeto, kaj ankaŭ mi, sin sentas alestigata al la vivo per tiu momento. Tiu vizio validas ankaŭ por la evoluistoj de evolukonceptado, kiu estas malsama ol tiu de la aŭtoro: nun jam certe ne malŝatendas tiu konceptado pri evoluo, laŭ kiu la elemento kuŝiĝas kun elemento nur pro tio, ke la evoluanto eniru, per *kosma akcidento*, la ĝustan medion favorantan ĝermadon de siaj enaj *esencaj ecoj, jam poseditaj*, tial ne *elekstere* aldonitaj. Kio ajn okazis, ni povas nin lasi treni de la poeto ĝuado ĉar ĝuste tiu *kosma akcidento* povas esti nur *okazo* kaj ne necese *kaŭzo* kiel kutime elpensas ekstremaj novdarvinistoj distancigintaj, fakte, el Darvino. Mi do konsentas kun la fono iom celisma de la poemaj esprimoj! Sed iom post io la hazardo-kazo fariĝas kaŭzo kaj tiam...

Nenie Dio.

Tiu kiu hipotezas la *kosman akcidenton hazarda kaŭzo* de la vivo kaj de ĉio historia, ne bezonas Dion kreanton: se pri tiu ĉi oni parolas en la poemo, tio okazas nur por lin likvidi. La *Infana Raso* parolas ofte pri Dio (kaj jen nia temo), kvazaŭ fikspense aŭ misie. Se temas pri misio, oni diru tuj, ke el la verko descendas impresoj pri misio kontraŭ Dio kaj ĉio, kio pensigas al li. Preskaŭ obsede.

Jen kelkaj citaĵoj pri tio kun provo ilin kompreni. Kion signifas tiuj vortoj finaj de la ĉapitro XXIV, kiuj antaŭ la nomataj naŭ planedoj, kaj preter la plej foraj galaksioj, sentigas la forton de la demando pri Dio ne troveblan?

*kaj preter tio, kaj preter tio
galaksio, kaj galaksio
kie dio?*

Mankas.

Kio mankas? Ĉu Auld, ateismemulo aŭ ankaŭ ateismemigulo? Certe, en la ĉielaj spacoj de la mitologioj, kiel respondojn al neelimineblaj demandoj, kies precizaj eĥoj ne mankas en ĉi tiu poemo (la poeto, ekzemple en ĉi ĉapitro, imagas, ke liaj posteuloj dezirus scii kial, impulsigita de la „*insisto de l' celo*“ (XXV), li donacis al ili la ekziston dum li antaŭvidas „*kaj ankaŭ vi demandos: por kio do... aktivo?*“), metis la restaĵojn de la dioj. Sed kiam la popoloj preĝis al siaj dioj, ili sentis ilin proksimaj, intimaj al si krom en la ĉieloj. Pli facilas, fakte, esprimi malsamecon kaj transcendon de dioj ilin loĝigante en la sideraj spacoj, sed kiam homo atentis pri ilia juĝo, rilate sian konduton, li sentas la diojn tiom proksime de si aŭ ene de si, ke ili fariĝas postulo-leĝo de sia konscienco. Aŭ ĉu la poeto volas diri, ke *dio* mankas ĉie? Kiom partopreniĝaj la emocioj tiom frostiganta la enhavo! Frostiganta, ja, por la racie bezonanto de Dio!

Aliloke mi ĝeniĝas kaj estas falanta en la kategorion *de kelkaj pruduloj, kiuj ne meritas konsideron*, laŭ la prefacisto Vilmos Benczik (paĝo 9 de la dua eldono). Kial *prudulo*, se mi diras, ke mi, kun aliaj miliardoj de vivantaj homoj, ne rekoniĝas en ĉi-subaj vortoj?

*“l'animo” estas pens’ kaj emocio:
cerbo kaj glandoj. Sen la korp’: nenio.*

Ni respektas la opinion de Auld kaj *prudule* ne maltoleris liajn ideojn, same kiel certe li ne maltoleris la miajn kontraŭajn. Nur ni demandas: el kio tiom da certeco en tiuj versoj? Ĉu Auld ne eksuspektiĝis antaŭ la amaso de kredantoj laŭ kiuj „*la animo*” estas pli ol nuraj *cerbo kaj glandoj*, io supermateria? Amaso farita ne nur de *pruduloj* aŭ naivuloj aŭ superruzuloj aŭ hipokrituloj (kategorioj entenantaj, laŭ la poemo, la dikredantojn) aŭ inklinaj al memtrompiĝo? Se la nombro ne fortigas la argumenton, almenaŭ prudentigu la poetan esploraltiron! Senombraj poetoj, ne malpli poetoj ol Auld, „kantante” pri io senmorta en la homo!

Aliaj poetoj, kaj ĉiuspecaj pensuloj, antaŭ tiaĵoj enpensiĝis pri la ĉiamdaŭra aspirado de homoj al iu supervivo kaj ne malhelpis eksentojn de admiro kaj kompatato kaj sendube de respekto!

Malgraŭ tio, tamen, kiom bela kaj partoprenebla ankaŭ la *espereto* (kanto XV), kiun la poeto esprimas rilate la estontecon de la homaro: ĉu la homoj fine komprenos kaj plibonigos sian vivsistemon anstataŭ ĝin difektigi? La poeto ŝajnas esperi. Sed esperi je kio?

Li esperas, ke homoj fine komprenos, ke bremsado al ilia civilizigo troviĝas en la eklezio (kristana certe) Ĉerpitaj tie kaj tie, jen sagĵetoj: *religiaj aŭtoritatuloj doktrinigas por ke la "edukitaj infanoj", eĉ plenkreskuliĝinte, rezonu stereotipe kaj restu pri iuj aferoj enŝtopitaj*. Oni vidu la ĉapitron VI-an en kiu tiuj religianoj estas komparataj kun "saŭroj kaj fosilioj, tio estas eksmodaj aŭ mortintaj relikvoj de la praepoko" (el lia persona komento, en la dua eldono); kaj la poeto trovas sian mision tion denunci por ke la homoj evitu forkuri en dogmojn:

*kaj ni alian solvon ne trovas ol... forkuri
en dogmojn, superstiĉojn, kruelon kaj doloron
kaj sklave ni diigas, nu, Kriston aŭ laboron (ĉ. XXV).*

La konscienca poeto ne akceptas, ke oni daŭrigu kredi reala la revatan sferon (diversloke). Koncerne tion, ankaŭ intelektuloj de religia kredantaro pri tio akordiĝas kun Auld. Ankaŭ ili de longatempo malkovris la emon de la homaj psikoj transsalti disde la dezirata al la reala sfero altirataj, puŝite de aspiro venki suferojn kaj superi limojn ĉiuspecajn, de la nekonscia forto (kiel efike esprimitas en ĉ. XXV: *Ni vivas por vivigi; sed ve! ni nin turmentas, / ĉar nia MI bezonas por pli ol tio sentas.*), kiun tamen eĉ intelektuloj kaj scienculoj de la religia medio igis konscia por ke oni ne sin lasu altiri kaj sorĉi de ĝi. Aŭ ĉu Auld opinias, ke kritika esploro ene de si mem kaj ene de la meandroj de la individua kaj socia psikologioj estas malkovro tute lia aŭ de liaj samopiniontoj? Kion sciis Auld pri la sennombraj esploroj, pri tiu aro da multflankaj sciencoj, produktitaj de sennombraj scienculoj de sennombraj religiaj aŭ teologiaj penscentroj? Ĉu ĉio ignorinda?

Ĉiukaze la analizo de iu psika fenomeno ne nepre kondamne senkreditigas la objekton subkuŝantan en la fenomeno mem. Jes, la deziro de iu realo bela kaj liberiganta povas kredi ke ĝi vere ekzistas. Sed kial aplombe sentenci ke ĝi fakte ne ekzistas? Unu afero estas analizi la koraspirojn kaj ties insidojn, alia afero estas procedi per racia vojo por esplori ĉu la ento sopirata vere ekzistas. Temas pri du malsamaj vojoj ne nepre sin ekskludantaj. Ne ĉiuj esperitaĵoj de alkemio restis fantaziaĵoj, se ekzempli tertere. Kaj ankaŭ: la aspiroj kaj la fantaziaĵoj pri universala artefarita lingvo helpa al ĉiuj popoloj trovis solvon, ĉu ne? Ni ne forstrekas ĝin pro tio, ke ĝi estis antaŭe tiom revata. Certe tiu denunciita senkritika transiro de revo al realo iel influis la originon de religio: sed ĉu nur tio estas la kaŭzo originanta religion?

Poemero de la ĉ. XXV diras "*nenion kredi sen pruvoj*". Ni subskribas tiun inviton, sur kiu la kredanta medio survojas ĝisfunde. Ĉu Auld kredas, ke ne estas tre vasta klaso de kredantoj, kiuj kredas post longa serĉado de pruvoj? kaj pro tio ne fidis je „fideismo“ kiu dume estas oficiale rifuzata ĝuste de la eklezioj?

Ĉi-koncerne io simila estas dirata de la poeto mem (ĉ. XV), kie estas ekzaltata la funkcio de la revo: Preskaŭ timige, ke la revo ĝermas / antaŭ ol la neceso sin malfermas, / ke solvas unu homa cerb' poblemon, / kiu ankoraŭ ne sentigis premon -/ ...

Trompiĝo kaj mensogo en la kredantoj.

Li ne timas enpoemigi:

*“Ĉiu -ologo konas sur sian -ologion
ol ni nek pli nek malpli komprenas vivon, Dion:
kiu proklamas solvon, mensogas...”. (XXV)*

Trans io obskureca, se el tiuj versoj oni interpretas, ke temas pri la ekzisto mem de Dio, la kristana intelektularo laŭlonge de jarcentoj kaj nune, opinianta pruvebla la ekziston de Dio, estas noble epitetata: mensogulo! Eble la inspira vervo tiom kaptis la poeton, ke li ne konsciiĝis, ke li estas malkaresanta sennombrajn homojn eĉ poetojn. Ja poetoj: inter tiuj intelektuloj estis sennombraj poetoj laŭ ĉiuj jarcentoj, ĉu ne? Ĉu mensoguloj eĉ ili?

Spite de ne senstreĉa klopodo tion ne konstati, leganto trovas ĉion kunligitan en la poemo. La supra kontraŭdia aŭ kontraŭreligia akuzo havas premisojn. La XIII-a ĉapitro bildigas Dion kaj religion iom goliarde, aŭ poemaĉe (*chitarronata* = *kitaronata*, itale) se uzi vorton, per kiu la itala poeto Carducci pesis, iom plimalfrue iom disigante el ĝi, sian poemon “Inno a Satana” (Himno al Satano). Auld diras en notoj, ke li prenis tiujn bildaĵojn el pionira skota liberpensulo: ĉu ili bildigas ankaŭ lian penson rilate kristanisman? Ĉu li konsciiĝis, ke tiu imagita kristanismo similas pli al disigitaj stumblaĵoj de ĝi ol al koherigita ordinara kristanismo, aparte tiu de la eklezio de li aparte atakata (nome la Katolika)? Nature tiu liberpensulo, tio estas ankaŭ Auld, ironie apostrofas pri Dio:

*Imperiestro ĉiela!
Tiran' de l' suprejo!*

Kaj prave Li tiel estas bildigata, ĉar la premisoj al tio kuntrenas. Jen la premisoj:

*pro murdo de ĝia filo
ĝia kolero malpliĝis.
Li ne turmentos eterne
ĉiujn animojn de ĝi kreitajn,
ĝi indulgos unu
el ĉiu miliono. (XIII)*

Eble tiu ironiaĵo sin apogas sur senfundamentaj “infanecaj” fajlaĵoj de kristana konfeso, sed tio malakordiĝas kun la tradicia kredo de la eklezio, laŭ kiu la Krista elaĉeto kaj enkarniĝo estas frukto de amo, ne de puno, dum la filiiĝo al Dio universas kaj etendiĝas space kaj tempe sur ĉiuj sekvantoj de la moralaj kaj religiaj sugestoj kaj postuloj de la propra konscienco, eĉ sur sincera ateisto. Antaŭ kaj sendepende de homa peka falo. Kiel malhelpi, ke tia ironiaĵo malplibonigu la kristanan mesaĝon kaj, laŭeble, oni ĝin ne formetu? Tio estas ke ankaŭ aliaj ŝtopiĝos ĉe “infana” kristanismo?

Nova kaj vera religio: la perfektigo de la homano..

Kaj el ĉio tio, kaj pro tio, la poemisto entuziasme lanĉas la unikan novan religion:

*Evoluigi nian genion kaj nian amon:
jen la sola religio.
Nia espero:
feliĉo de niaj posteuloj.
Nia fido:
perfektigeblo de la homoj. (ĉ.XIII)*

Por li evidentas, ke religio estas nure superstrukturo: iu ideologia produktaĵo amasiĝinta sur la veron kaj forviŝenda por plani al *infanrasulo* la vojon al vera homiĝo de-

mitiganta la sovaĝecon ĝisnunan same kiel, se profiti de infana literaturo, la ligna marioneto Pinokjo demetis sian lignecon por fariĝi vera knabo.

Iuj poemaj esprimoj ŝajnas naivaj spuroj de materialismaj marksismoj. Se ne sufiĉus la supra bildo de superstrukturo, oni vidu ankaŭ:

*“L’animo”.....
Ekster la sensokvin' ĝi ne ekzistas
kaj ĝin prediki estas mistifike. (Ĉ. II)*

Mistifiko aludas ĉi-kaze amasiĝon de senracia kredemo kaj trompigemo en damaĝo de kredemuloj! Certe, kutimaĵoj miaj, kaj de sennombraj aliaj, haltadi ĉe Platonaj libroj kaj trakuri la senfinan liston, se resti ĉe la vicoj de filozofoj, de *emuloj kredi pri senmorta animo kaj pri Dio* florintaj laŭlonge de jarcentoj, devus vere ĉesi por ne kunloĝi kun mistifikuloj!

Estas sendube, laŭ la subaj versoj, damaĝantoj kontraŭhomaj, tiuj kiuj pluesploras aŭ plukredas je postviva vivo:

*tiuj malhelpas solvon de l' problemoj,
kiuj pri la posta mond' insistas. (Ĉ. II)*

Bedaŭrinde, povas okazi ke religio, kaj ankaŭ Dio, fuŝe konceptata kaj praktikata, *malhelpas* solvojn de gravaj problemoj; sed fuŝa religio, kaj ankaŭ Dio plektita al homa mezuro, ne estas religio, kiel ne estas ideala esperantisto kiu uzas esperanto por mensogi kaj trompi. Krome se tiu akuzo rezistas, ĝi duoble etendiĝas ankaŭ sur poezion kaj poetojn: se verus la supra Aulda akuzo, necesus dedukti, ke ankaŭ grandaj poetoj, kaj grandaj poeziaj verkoj (ĉu eblas ĉi tie listigi ĉiujn?), malhelpis kaj malhelpas solvon de “problemoj” per iliaj religieco poezia kaj poezieco religia.

La dua ĉapitro meritas apartan atenton pro iuj aŭtoraj sintenoj: komparante du religi-soci-konceptadojn, nome tiu kristana kun la antikva greka, li trovas, ke en la greka sistemo:

*neniu rajtis homojn elimini
pro krimo de hereza opinio.*

Ĉi tie la poeto enmetas fingrojn en veran limon de religioj: persekutado pro hereza opinio. Auld trovas, ke la greka religio ne persekutis herezulon. Sed pri tio alvenas kelka dubo: ĉu ne estis tia religi-konceptado, kiu praktikis al kristanoj la punon, kaj kian punon, pro malpieco kontraŭ la dioj? Ĉu ne estis punata Prometeo?

Kvankam la aŭtoro en noto provas malpliigi la impreson sur la publiko konigante, ke la poemo celas malŝatigi nur dogmemon, ne religiojn, la aludoj al kristanismo pro forigenda dogmemo tiom elstaras, ke tiu distingo malmulte ekskuze funkcias, eĉ male. Katolikismo krome ricevas sian apartan dozon de ĝentilecoj:

*... “Ŝtat’ agnosku ke l’ unika
kaj vera vero estas katolika”,
kaj sekve per polico kaj bastonoj
devigu ĉiujn al komform’... publika.*

Eble la poeto ne alkroĉigis tiun “katolika” pli pro rimbezono ol pro tio, ke en lia imaga juĝ-sinteno, katolikismo emblemas ĉiun malbonon. Fakte, se resti inter kristanoj, ĉu multas la “katolikaj” kaj “nekatolikaj” ŝtatoj, kiuj ne faris tion? Ĉu Auld devis propre elmigri por trovi tiuspecajn taŭgajn ekzemplojn?

Sed ankaŭ plihejmecaj ekzemploj ne mildigus ĝenerale tiun same kiel aliajn maku-lojn, kiuj vere humiligas religiojn, kvankam ilin oni ne rajtas separi el la esenco, el kiu

konsistas religio, dum mem religiuloj kapablas sin korekti kaj sin kondamni kaj pardonpeti kaj kondute koherigi kun sia religio!

Plurfoje la poemo ĉiukaze elstariĝas per proklamo (aŭ per nova celo kaj malnova profetaĵo, ĉu eble?):

*La raso estas juna: ĝi konstruos
teran ĉielon - post la mort' de Dio*

La kredantoj (kristanaj) estas malpli pretendemaj: laŭ ili, oni povos konstrui teron iom ĉielecan akordiĝante pli kun la Diaj impulsoj ol kun la violenta emo ilin elimini. La homa libero, tiom ekzaltata eĉ en ĉi poemo, helpata de ideologioj, kaj en Auld tio estas sperto kaj konkreta idealo, fariĝas bela poemo kun tokso ene.

Kaj se la subkuŝanta kaj invadanta ideologio, sendube poete mirige esprimita, falus ĉe la leganto kaj ĉe la pensevoluanta poeto, kio restus?

Nure tera destino de la religie perforta homo.

La homo, laŭ Auld, ne havas iun ajn transcendan destinon: ĝi tute sin konsumas en la celo:

*la celon ni plenumas
la celo nin konsumas. (V)*

Kun la espero ne harhirtigi prudulojn pri kristanaĵoj, oni notu, ke kristanismo ĉi-punkte klarigus, ke dum homo plenumas sian *celon* (individan kaj specian), mem realigas alian celon: savi sian unuopulecon, ĉar ĝi estas originalaĵo neripetebla, al kies libereco estas donacita la eblo ĉiamiĝi en sia unuopuleco.

Auld bonŝance metas fingrojn ankaŭ en kroman veran vundon, tiun koncernantan kontraŭdirojn de la homa religiemo. Li fakte vidigas pastrojn kaj popolamason farantaj religiajn ceremoniojn tra *plumoj, fanfaro, incenso, preĝo, ofero...* kvazaŭ, laŭimprese de leganto, preparo al makabra spektaklo (ĉ. XVI):

*Sur la foira placo oni frakasis
la kapon de herezulo, kiu ne kredis
la teron plata.
La pastroj tion aprobis,
sciante mem, ke tamen la tero sferas". ke veras via dio. (XVI)*

Similaj esprimoj trafas la legantojn diversloke kiel ĉe la fino de ĉ. XIII.

Ĉi-rilate Auld ne vidas en tiaj fiaĵoj kulpan nekoheron kaj misuzon de religio, ne suspektante tamen ke jam Kristo estis viktimo de religia persekuto, kaj la leganto estas altirata senhezite identigi kun tiaj fiaĵoj religion. Religianoj akordiĝas kun li kontraŭ religio misuzata kaj eble kontraŭreligie interpretata; sed ili kapablas malŝati, kiel en ĉiu socia fenomeno, la konduton en okazaj, eble kulpaj kaj sendube kondamnendaj, praktikaj, kaj ili tion faras sen bezono por gigantigi tiujn kulpojn por sin rajtigi kondamni la tutan koncernatan socian religian fenomenon. Ĉu ankaŭ ni modernaj ne travivas en similaj socioj kaj estas devigataj distingi doktrino-principojn disde kontraŭaj kondutoj? Ĉu Auld neas la ekziston de la ĝustaj bonaj principoj de la homa socialeco pro la evidenta kontraŭdira homa historio? Ĉu ni kondamnus esperantismen, se ni sciiĝus pri esperantistoj malpiece nin kalumniantaj ĉe niaj malamikoj? Ankaŭ religianoj do vidas misfarojn en intertempaj religiaj ŝtatoj. Tamen kial senapelacie malnobligi ĝis malŝatige difini religion mensogo kaj mensoguloj ĝiajn anojn? Iam, pli delikate, oni ilin difinus iluziigintoj kaj mensogiĝintoj, ĉu ne? Kiel sin sentas, legante la "*Infana Raso*"-n, tiuj,

kiuj kredas aŭ akordiĝas sincere kun religio? Ne estas ni kiuj neas ke la malbela fenomeno de mensoguloj en religio ne ekzistis: sed ni demandas: ĉu tio estus la kaŭzo kaj la forto kaj la fundamento de la religio?

Oni ne diru ke kredantoj ne suferas pro tiuj misfaroj kaj ne daŭre pretas sin humiliĝi. Sed kiel sciante, pli facilas krei kontraŭ pestodistribuanto ol pruvi, ke li ne ekzistas, enŝovas Manzoni en la romaneto “Malnobliga kolono”. Kiu scias, ĉu hodiaŭ Auld skribus tiajn versojn konsiderinte, ke li mem en la hodiŭaj notoj hastas diri, ke li ne intencas ofendi la unuopajn kredantojn.

Bedaŭrinde li mem aliloke (II) allasas:

*diri malhumile: ke veras via dio, falsas mia,
estas, nu, minimume, malĝentile.* (II)

Ĉu diri, ke nia Dio ne ekzistas aŭ inspiris aĉaĵojn kaj ke ni trompiĝas kaj trompas kaj ke niaj aŭtoritatuloj hipokritas... ĉu tio konturiĝas ĝentilece?

Aliloke (ĉ. XV) la poeto severe riproĉas religion, kiam li malkaŝas ne aprobendan sintenon de franĝoj de kredantoj preĝantaj al sia Dio tuj post ĉiuspecaj krimoj kontraŭ-homaj:

*Oni fiaĵa sur preĝeja benko
(kaj morgaŭ dankos Dion pro ĉi venko).* (XV)

Ni fortenu tion kun li, ne forgesante tamen, ke ankaŭ religiemo postulas edukiĝon same kiel aliaj homaj inklinoj kaj kondutoj, kaj ke en tiu eduka tasko engaĝiĝas multaj kredantoj. Estas universala tento de homo provi plekti Dion al propraj deziroj kaj malamoj, laŭte atestata aparte en la hebrea-kristanaj Skriboj, kies intima senco povas sintezigi ankaŭ tiel: priskribo pri la luktoj de Dio por defendi kaj encerbigi la ĝustan nocion pri si inter popolo inklina imiti etnajn kondutojn: la Biblio montras samtempe, kio estas Dio kaj kio volus esti homo. Tra tiuj tento kaj risiko pasas ĉiu homa gado.

Horora edukado fare de la ekleziuloj.

En la ĉapitro sesa estas dirate kiel agus la ekleziaj aŭ gepatraj aŭtoritatoj edukantaj al kristanismo: ili en najligas la infanan memoron, la *preskaŭ fetan cerbon*, por eternigi sian doktrinon kaj por certigi, ke la posta konsenta “rezonado” okazos surbaze de “akceptindaj” premisoj, se entute ĝi okazos (el aŭtoraj notoj). Per tiu sistemo ili malhelpus, laŭ la poeto, evoluon aŭ plibonigon de moroj ktp, entute ili kompareblus al *daŭroj* kaj *fosilioj* pro sia eksmodo. Necesas do bloki tion

*“Por kio? - por ke rozoj de feliĉo
burĝonu, kie neĝa blovo siblas”.* (VI)

Estus interese imagi kiel li transdonus la ĉi-poemajn ideojn, se li estus edukanto: tiuj ĉi plonĝus sur la leganton senindulge kaj, se transdonitaj ekde la *feta* tempo, ĉu ili favorus alibazajn *rezonadojn*? Ni opinias, male, ke ĉiukaze homo posedas sufiĉe da libero taŭgiganta novan elekton kiam prezentiĝas vera kompleta scio.

Kaj ne opinieblas, ke Alapud intencas kritiki la edukan sistemon, kiel mi esperis dum la unua legado. Male, lia kondamno kaj rifuzo naskiĝas ĝuste pro la kristanaj ideoj antaŭ kiuj li suferas kiel antaŭ honoraĵo; se tamen temas pri eduka sistemo-metodo, ĝuste de li ni atendas tiun, en kiu edukanto kapablas ekskludi la celon firme konvinki edukatojn kaj samtempe ilin igi kapablaj ne rezonadi laŭ la komunikitaj akceptindaj principoj. Kiel *sin liberigis* de kristanismo tiuj, kiuj ĝin forlasis, inter kiuj certe sin liberigis Alapud mem, kaj kiel kristana intelektulo fariĝas nekristana aŭ kontraŭkristana? Tio okazas, ĉu ne? Eble en la poemo Alapud tro dependas de sia koncepto pri homo

”sen la koro’: nenio!”). Kaj okazas, ofte, la kontraŭo: forte edukitoj kontraŭ religio pasas al religio!

Kio bela en la poemo nemal beligata?

Troviĝas ankaŭ belegajoj inter la malbelajoj de la poemo, bonŝance. Fakte bela kaj alloga, pro la delikataj kaj trembrilaj senvostuloj, la priskribo pri patro sopiranta, ke la anoncita filino eniru tiun strangan mondon kaj serĉu sian vojon, vojo (ĉe. XI) kiu estos signata ankaŭ de antagonismoj kun la patro mem, en kiu tamen ĉiukaze venkos la patra kornusacoj por konduki la filinon ankaŭ tra zorgoj vari specaj kaj konsilioj, eble ne akceptitaj:

*venu, kaj mi vin amos, vin ŝirmos se mi povos,
ĝis vi la propran vojon en propra mondo trovos. (XI)*

Ŝajnas, ke estas el burĝonanta (aŭ ĉu ĝi jam kuŝas en la tiu ĉapitraj versoj?) himno al la patreco kvankam Alapud vidas patrecon prefere kiel materian ĉeneron kaj ne ankaŭ kiel inicigon de estulo destinita fariĝi filo de supera patreco. Eĉ ĝuste tia patreco estas preskaŭ tuj vidigata neebila tie, kie estas imagita praulo suspekteme eniranta arbaron, kies eniro (ĉu arbaro figuras civilizon infektitan je religio?) se ne suferas pro la obstakloj de la jam malaperintaj *daŭroj*, bedaŭrinde trovas antaŭ si alian obstaklon:

*..... sed dioj de l' arbaro
koleras kaj ĵaluzas pri ĉia homa faro. (XI)*

La dio ĵaluzo kaj ne tro amika al la homa progreso, kelkfoje aperis en antikvaj mitoj, sufiĉas rememori Prometeon kruele punatan fare de la dioj pro la ŝtelo, el la diaj lokoj, de la fajro donacota al la homaro. Brilas tamen ankaŭ la mito de la dia patreco, io simila al tio, kion la ĉi poeto provas antaŭ la filino sin anoncanta el la patrina sino: brilas ankaŭ en la hebreaj-kristanaj skriboj, kie estas dirate, ke Dio transdonas la tutan kreaĵaron al la homo, por ke tiu ĉi pri ĝi ĝoju kaj laboru (Genezo) kaj tiun ĉi akompanas en la konstruado de propra liberiĝo kaj transformigo de la mondo (evangeliaj paraboloj). La biblia Dio estas pli vere figurata de Prometeo mem ol de la mitaj dioj ĵaluzaj. Tiuj pensoj povas ĝermi en poeziaj vejnoj nur se la religio ne estas jam markata per antaŭhumanismemo.

Kiel sciante, poetoj foje por ĉerpi inspiron kaptas eventojn el la historio. La XIII-a ĉapitro plonĝas en la historion de la originoj de kristanismo, aplombe sciigante ke:

*... en la dua jarcento
la kristanoj en Judea,
kiuj fidele sekvis / la morojn kaj kredon
de la dekdu apostoloj,
informiĝis, ke ili estas
herezuloj. (XIII)*

Vere la historio ne tias: la unua eklezio de *Judujo*, post la morto de apostolo Jakobo “la pli juna”, episkopo de Jerusalemo, jam subteninta ke por la kristanoj hebreaj konvenas observi ankaŭ iujn moseajn-hebreajn leĝojn, permesante tamen, ke la kristanoj ne-hebreaj sekvu la instruojn de la apostoloj ne altrudantaj, per tiu jugo, la kristanojn ne-hebreajn, bedaŭrinde dividiĝis en du partiojn: iuj elektis episkopon Simeonon, kiu sekvis la instruojn de la apostolo Jakobo, aliaj (diritaj judaizantoj ĝuste pro ilia konvinko, ke ankaŭ kristanoj ne-hebreaj estis devigataj sekvi la tutan mosean-hebrean leĝon) oponis sian propran episkopon Tibuthis-on, kiu, kun siaj posteuloj ĉiuj parencoj de Jesuo, volis laĉi ĉiujn per la mosea-hebrea leĝo kaj evidente ne sekvis la *morojn kaj*

la kredon de la dekdu: pro tio la aliaj ĉirkaŭaj eklezioj, inkluzive de tiu jerusalema, vidis en tiu komunumo pli da herezo ol da fideleco je la kredo transdonita de la dekdu. (Kuriozaĵo: tiuj du grupoj, same kiel la samtempaj hebreoj nekristanaj, senkontraste uzis la saman simbolon: la sespintan Davidan stelon!)

Kial la poemo engolfiĝis inter tiuj kvereloj? Ĉu por senkreditigi la originojn de kristanismo? Ĉu nur misinformo aŭ ŝerco de ideologio?

Ankoraŭ aludoj ne tute agrablaj al la kristanismo.

.....
*'sed ne sukcesis pruvi la superecon
de l' kristanismo'*
Mi ridas jam. (XX)

oni legas en ĉapitro XX referanta, eble, pri iuj misiantoj inter indianaj gentoj. Kial *supereco*? Entrepreno ege malfacila kaj eble neebla, ĉar antaŭe necesas scii, kio estas la homo kaj kia lia destino tempa kaj, se ĝi ekzistas, transtempa. Kaj krome, je kio servus *supereco*, se kristanismo estus senfundamenta aŭ ne kontentigus la raciajn postulojn de la menso esploranta ĝian originon? Pli bone, do pruvi sian verecon. Se ĝi meritas tiun kvalifikon ni povas ĝin kompari kun religi-sistemo de la iamaj indianoj.

En la ĉ. XXIV por la poeto neforlasendas kritiko, eble iom duonironia kaj certe subtaksanta la celojn kaj la rezultojn de la taktiko: per la paperfolioj, katolika pastro estis denunciata tion, kio okazadis en la tiama Sovetunio, kie la kompartio eltrovis la efikon:

*devigi la popojn debati pri l' religio
ho anarkio, anarkio! (XIV)*

Reakcia pastro! Se oni pensas, ke tiaj ruzaj debatoj servis por konfuzi la popolon kaj encerbigi “pruvojn” kontraŭ “la danĝera ideologia superstrukturo de la religio”, kaj se oni scias kiom da milionoj el la kredanta popolo estis mortigita pro religiaj motivoj, por ke ne aperu cinika tiu ironia citaĵo, oni esperu, ke ĝi intencis rimarki okazajn imageblajn humuraĵojn ĉar eĉ tiama intelektulo ne povis ne atingi dokumentitajn informon pri tiuj genocidoj. Ĉu nur W. Auld ne sciis? Aŭ ĉu Auld tute indifera?

Krone de ĉiuj tiuj rimarkoj, kaj fine, ne devus manki alia pli ĝenerala pripensado por pli klare komprenigi la motivojn de niaj suferaj kritikoj al iuj enpoemigitaj konceptoj rilate religion. La verkisto plendas kaj ironias pro la kontraŭdira kaj damaĝa konduto, kaj pro la malkonstantaj antaŭeniĝoj al la plejbono, sub kies leĝoj homo povus kaj devus pluri, kaj pledas kaj aŭspicias (aŭ ĉu li antaŭvidas?), ke plejbono estu atingata! Sen plikomplete esplori pri tiu ebla, laŭ Auld, destino de homo al plejbono, facile intuitivebla je konsidero de lia vivvizio tute tera kaj eĉ opiniiganta, ke Dio kaj transvivad-penso damaĝas la verajn homajn celojn, oni volus rimarkigi, ke al li forfuĝas grava nocio; kaj tio ne povus ne forfuĝi, ĉar kontrastanta kun lia viv-konceptado. Temas pri aparta nocio pri libero, tiu ĉi: normala homo konservas ĉiam la liberon kondukti favore aŭ kontraŭe al la bono konata, pro impulso de la aspiroj posedi tuj diversajn plikontentigajn bonaĵojn, ankaŭ kiam tia sinteno fine damaĝos lin kaj aliajn. Je tia libero neniu senigas sin mem aŭ sin lasas senigi. Temas pri koncepto de libero devenanta de kristanismo, libero ĉiam bezonanta je subteno kaj elaĉeto: estas la elaĉeto, pri kiu parolas iuj religioj, eble ĉiuj. Homo realigas necese sian celon, tiun komplete homan, per tiaj liberaj elektoj. Ĉu antaŭvideblas, ke la venonta homo elektu ĉiam la bonon por si kaj por la aliaj? Estas nur *espereto*, kiel eĥiĝas en la fina ĉapitro kvazaŭ de eksterkampa voĉo: *iam venos / la regno de l' racio; / sed multaj larmoj/ necesos antaŭ tio*. Espereto ta-

men ĉiam riskanta fariĝi elreviĝo pro la risko, ke en la libera elekto triumfos egoismo.

Ĉu eblas pli da antireligiismo kaj kontraŭkristanismo?

Kaj se post tiom da ĉi-artikolaj kritikaj taŭzadoj rezultos, ke iuj poemaj ĉapitroj diras ion por aludi alion aŭ postulas diversan interpreton pro tio, ke la aŭtoro plektaĵe apudmetas *konstatojn* kaj travivaĵojn de la homaro kun minimuma persona kuntreniĝo - kio al mi ŝajnas ne multe probable ĉar, tiukaze, nekompreneblas kial religio kaj ĝiaj apudaĵoj estas superŝutataj per tiom da malŝatoj - necesus ke mi hastu ripari kaj fleksi antaŭ la heterogeneco de la celoj ankaŭ en poeziaj verkoj. Des pli ke ne nur pri unu poema ĉapitro mi, kaj miaj kunlegantoj, rezignis ĵuri pri supozita signifo: la notoj enkondukitaj en la lastan eldonon, eble, ankoraŭ ne sufiĉas por homoj... ne kutimiĝintaj al poezio.

Ni riproĉas Auld je nenio: li pensu laŭvole. Mi nur deziras, ke mia religio estu juĝata, se ĝin juĝi iu volas, laŭ ĝia vera enhavo kaj ke neniu indiku min "trompanto aŭ trompiĝanto" pro tio ke mi estas Dikredanto.

Licas, sed tio marĝenas, ankaŭ la demando: ĉu la senmizerikorda akuzo kontraŭ religio utilas al religio? Eble jes, malgraŭ ke nia verkisto sin faras ekzekutisto de epokoj dum kunigas anatomiajn pecojn de socia kaj morala *korpuso* senreligia.

La prefacinto Vilmos Benczik dirus, ke *pruduloj ne meritas konsideron...* "tiom pli, ke neniu el ili kaptis la esencon de la verko" (en la prefaco de la dua eldono). Oni, kiel senkulpiĝo, respondus, ke ĉi tie oni ne volis paroli pri esenco de la verko aŭ pri la poezieco de la poemo, kiun oni trasentas kaj aplaŭdas; oni estis devigata halti antaŭ aŭdacaĵoj minacantaj karamboligi la leganton ekster poezio. La esenco estus pli kaptebla kaj ĝuebla se la poeto, sen rezigni siajn vidpunktojn, respektus la leganton mem, ĉu ne?

Mia fina konkluda estas: W. Auld en *Infana Raso* riveligis vera misiisto, sed misiisto de ateismo, de la ateismo plej materia, kaj mania malsatanto pri ĉio religia. Kaj se la verko estus liberigita el tiu invadanta humoro, ĉu la poezieco restus la sama?

Armando Zecchin (1998)

Oni povas legi la tutan tekston de "La Infana Raso" ĉi tie:

<http://www.sunela.eu/maku/Esperanto/La%20infana%20raso>